

Pri la esperanto-bibliotekoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 559/88-1, 1982 februaro 18 kaj 20.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-88/SRI-1982-88-2-559-Claude-kaj-Andree-GACOND-Pri-la-esperanto-bibliotekoj.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tri aŭskultantoj esprimis sian intereson pri nia decembra elsendo raportinta pri la broŝuro de la UEA-Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, kiu raportis pri "Ses esplorcentroj pri interlingvistiko". En nia recenzo ni diris, ke tiu ĉi raporto estis bedaŭrinde tre nekompleta kaj subjektiva en la elekto de la priskribitaj dokumentejoj.

A.- Ni salutas tiujn ĉi aŭskultantojn. En Francio, s-ro Claude Roux, en Marseille; en Britio s-ro Bruno Najbaro en Keighley kaj denove en Francio, s-ro Lucien Giloteaux en Croix, kiu skribis :

Cl.- "Tre interesis min via elsendo de la 12-a de decembro, 19-a horo: UEA-broŝuro (ne kompleta) pri esplorcentroj (eble estos dua eldono ĉu de tiu broŝuro, ĉu de la libro de Marinko Ĝivoje). Fakte la temo estas vasta, kaj la diferenco estas ne ĉiam facile difinebla inter granda biblioteko, konsultebla aŭ ne, kaj "esplor-centro". Pri via elsendo, mi mallonge informis s-ran C. Vanbiervliet.

A.- Tiuj diroj de s-ro Lucien Giloteaux estas tute pravaj. Kio plej gravas, tio estas, ke la esperanto- kaj interlingvistikaj dokumentejoj estu konsulteblaj de la serĉantoj. Pro tio privataj arkivejoj akiras gravecon nur kiam ilin kataloge prizorgis publikaj bibliotekoj. Kaj tio reprezentas enorman laboron temporaban, multe pli fakistan ol ĝenerale imagas la konsultontoj de la rezultanta sliparo.

Cl.- En la esplor-centro, kiun ni gvidas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds ni plurfoje lorigis helpemajn studentojn. Ĉiam ili unue miris, malkovrante, kiom la bibliotekista laboro estas kompleksa. La katalogado de libroj, broŝuroj, revuoj, manuskriptoj, fotoj, diskoj, sonbendoj, cirkuleroj, prospektoj, ktp. estas ege malfacila afero, kiu povas kontentige efektiviĝi, nur se oni akiris tre fakajn konojn. Helpanto nur povas plenumi tre simplan taskon, kaj eĉ tiam, li devas dediĉi sufiĉe longan tempon al lernaj ekzercoj. Tio klarigas, kial privataj bibliotekoj kaj dokumentejoj estas malfacile konsulteblaj sen la helpo de la posedanto kaj kial, kiam publikaj bibliotekoj ilin heredas, ĝis kiam la tuto fariĝas konsultebla, oni devas pacienci ofte dum pluraj jaroj aŭ eĉ dum pluraj jardekoj.

A.- Ĝuste la helpantoj baldaŭ malkovras, kiom temporaba estas la nura ordigado de revuo, la analizo pri la enhavo de libro aŭ letero kaj ofte la serĉado pri la vera nomo de aŭtoro, kiu sin kaŝas malantaŭ pseŭdonimo, de la eldonejo aŭ eĉ de la aperjaro. Tre ofte sur multaj dokumentoj mankas bibliografie necesaj indikoj. Kiam la staĝperiodo du- aŭ tri-monata konkludiĝas, tiuj helpantoj estas iom malkuraĝigitaj, ĉar la plenumita laboro pli etas, ol ili antaŭvidis, kaj ĉefe ĉar ili ekkonscias, ke la bibliotekista laboro estas multe pli malfacila, ol ili imagis. Tiu ekkonscio pri la komplekseco de la laboro bibliotekista estas la komenco de saĝa kaj efika sinteno.

Cl.- Por povi fruktodone analizi la tre utilan libron de Marinko Ĝivoje, kiun s-ro Lucien Giloteaux aludis en sia letero, oni devas nepre konscii pri la komplekseco de la bibliotekista laboro. Tre bone kompar-kriterio inter la esperanto-dokumentejoj estas, ĉu ekzistas aŭ ne analiza sliparo, kiu kompletigas aŭtoran kaj titolan sliparojn. Fakte tre malmultaj esperanto-dokumentejoj tion posedas. Tiuj, kiuj ilin starigis, havas enorman superecon super la nuraj

deponoj de libroj ne enhave analizitaj. La serĉantoj bezonas la servon de detala analiza sliparo, kiu devas konstante perfektigi, laŭ la konsiloj kaj kritikoj de la serĉantoj mem.

A.- La serĉantoj ankaŭ deziras akiri katalogon de la bibliotekoj, por vidi, kie troviĝas la konsultotaj libroj. Ju pli granda estas la libro-kolekto, des pli malfacila kaj multekosta fariĝas la eldonado de katalogo. Tial la senĉese kreskantaj dokumentaroj ne ofte eldonas katalogon. Ili jam havas sufiĉe da laboro por pretigi la sliparon. Pro tio la katalogoj rapide malakuratiĝas. Ili restas fidinda laborbazo, nur se jaron post jaro eldoniĝas bibliografiaj aldonaĵoj. Ni ne konas esperanto-bibliotekojn, kiuj kapablis tion ĉi entrepreni.

Cl.- La ĉefa kritiko, kiun ni faros pri la tre bone dokumentita kaj tutcerte tre utila libro de Marinko Gjivoje, kies titolo estas "Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj" estas, ke ĝi ne analizas la rikoltitajn informojn. Mankas ekzemple tabelo, kiu listigus ĉiujn menciitajn dokumenteojn, dirante ĉu jes aŭ ne ili posedas analizan sliparon, aĉeteblan katalogon, ĉu ili estas malfermitaj al la publiko aŭ ne, ĉu ili estas privataj aŭ publikaj, ktp. Verŝajne la pretigado de tiu ĉi resuma kaj analiza tabelo superis la forton du unua enketisto. Nur okaze de dua enketo, kiu antaŭdifinus sian celadon, oni povus respondi kun precizo al tiaj demandoj, kiuj havas tre grandan gravecon por serĉantoj.

A.- Ni diras al vi ĉion tion por konsciigi vin pri la komplekseco de la situacio. Ne sufiĉas decidi, ke en ĉiu lando ekzistu esperanto-dokumentejo, por ke tiuj bibliotekoj ekeksistu. Ĝenerale malantaŭ ĉiu biblioteko kaj muzeo de esperanto kaŝiĝas enorma sumo da sindono. Pri tio vi ekkonscios la venontan semajnon, kiam ni cite legos al vi interesajn partojn el la raporto de Marinko Gjivoje. Eĉ la Internacia Esperanto-Muzeo ŝuldas sian ekziston al homoj, kiujn ni devus multe pli alte taksi.

Cl.- Sed ĝuste, ĉar la publiko ĝenerale ne konscias, kiom da laboro kaj mono reprezentas la librokatalogado kaj la arkivokonservado, la pioniroj kiel Hugo Steiner, Hector Hodler kaj Hans Jakob estas miskonsiderataj. Ekzistas eĉ certa misestimo por la arkivkonservistoj, kiujn en certaj lingvoj oni nomas biblioteko-ratoj aŭ papermanĝantoj.

A.- Eĉ la eldonistoj ne ĉiam konscias, ke se ili ne donacas al kelkaj gravaj dokumentejoj specimenojn de siaj eldonaĵoj, la estontaj generacioj malmulton scios pri ilia laboro. Pro tio ekzistas en ĉiu civilizita ŝtato centra biblioteko, al kiu la eldonistoj devas alsendi senpage siajn eldonaĵojn. La esperantistoj, kiuj pionire agas, tion ĉi ne faras. La esperanto-grupoj ofte neglektas la publikajn urban kaj ŝtatan bibliotekojn, kiam ili dissendas sian informilon, same estas por la aliaj dokumentoj, por la revuoj, broŝuroj kaj libroj, por la kongresdokumentoj, kunven-raportoj, ktp. Tial sufiĉas krizo en la vivo de societo, por ke komplete malaperu ĉiaj vivsignoj pri la antaŭkriza periodo. Ni ne miru, ke la esperanto-historiistoj tiom penas, por malkovri kelkajn precizajn spurojn pri la aktiveco de la pioniroj de nia movado.

Cl.- Povu la nuna generacio ekkompreni la gravecon de la bibliotekoj por esperanto mem.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond citos al vi kelkajn interesajn erojn el la raporto de Marinko Gjivoje pri la esperanto-bibliotekoj. Ĝis reaŭdo!